

- 621.3 **Elektroteknika Terminaro:** *Elektroteknika Sekcio de ISAE*, sekr.: dipl.ing. A. E. K o r p e l a, Finno, Helsinki, Finlando.
- 625.2 **Fervoja Terminaro:** *Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)*, Terminara Komitato, gvidanto: s-ro Gernot Ritter spach, Poŝtfako 20, (17a) Bammental bei Heidelberg, Germanujo; Traduko de „*Lexique Général des Termes Ferroviaires edité en 1957 par l'Union Internationale des Chemins de Fer*”.
- 635 **Hortikultura Terminaro:** s-ro Ladislav K y n ĉ l, Rudé armády 8/486, Praha 8, Ĉeosl.
- 634.9 **Arbarkultiva kaj Forstekonomia Terminaro:** a) s-ro Ludwig Bechtold (Hess.Forstamt), Bornsbachstr. 1, (16) Gladenbach, Germanujo; b) ing. Georgij A r n a u d o w (Bulgara Esp.-Instituto).
- 677 **Teksindustria Terminaro:** S-ino Marie B a r t o v s k á, Bruzovská 330, Místek, Ĉeosl.
- 72 **Arkitektura Terminaro:** *Internacia Rondo de Esperantistoj-Arkitektoj* (aŭ *Unuiĝo de Arkitektoj-Esperantistoj*). Estraro: Ing. Jaroslav H ŭ d a, Brněnská c. 16, Jihlava, Ĉeosl. kaj ing.ark. Vladimir Š t r u c e l j, Krašova ul. br. 27/IV, Zagreb, Jugoslavio.
- 77 **Fotografia Terminaro:** fil. mag. Vilho Setälä, *Esperantotie 4*, Irislahti, Matinkylä ĉe Helsinki, Finlando.
- 91 **Geografia Terminaro:** *Int. Geografja Asocia (IGA)*; prez.: Lic. Tibor S e k e l j, Kondina 24, Beograd, Jugosl.; sekr.: dipl.ing. W. von der Ley, Ulrichstr. 18, (14b) Tailfingen/Württ., Germanujo.
- 930.26 **Arkeologia Terminaro:** s-ro Marinko G j i v o j e, Gornji trg. 31, Ljubljana, Jugoslavio.

Rim.: La aŭtoroj bv. anonci sin tuj kiam la manuskripto estas preta.

(5) **Fakvortaroj novdate aperintaj.** - Komence de 1960 aperis - en la dua parto de UEA-Jarlibro 1959 - la **TEKNIKA TERMINARO PRI ŜOSEOJ KAJ PONTOJ** de A. Broise; ĝi estas aranĝita alfabete laŭ la superordigita nocio, kaj enhavas post ĉiu esperanta termino la anglan, francan kaj germanan tradukojn; antaŭmetita estas detala frazeologio, kiu tre favore anstataŭas la difinojn de la vortaraj terminoj. Ni gratulas s-anon Broise pro tiu ekzakta kaj diligenta laboro.

(6) **Adresŝanĝoj**

Dellian, Kurt, D-ro (kemio), Hoechst do Brasil, Caixa Postal 1529, Rio de Janeiro, Brazilo.

Happach, V., D-ro (geodezio), Albsfelderweg 20, (24a) Ratzeburg/Lbg, Germanujo.

Pióro, Jan, mag.ing., Str.Reja K8/19, Piastow ĉe Varsovio, Pollando.

Rogister, C., rue des Carzières 49, Verviers, Belgujo.

(7) **Plena Ilustrita Vortaro (P.I.V.)**

La redaktado de la teknika-sciencia parto de PIV nun finiĝis; la sliparo bonorde alvenis ĉe Prof. G. W a r i n g h i e n, kiu kunfandos ĝin kun la komunlingva parto de la vortaro. Vi do vidas: P.I.V. marŝas!

R. Haferkorn

61 : 058 : 362.1-05 = 089.2

## GRAVA ALVOKO

Certe ĉiu esperantisto konas, almenaŭ laŭ famo, la grandan mondfirmon *PHILIPS*, kiu en siaj diverslandaj fabrikoj (189 000 laboristoj kaj oficistoj!) produktas elektrajn lampojn, radio-, televido-, Röntgenaparatojn kaj centojn da alispecaj aparatoj elektraj.

Ĉe la centro de la firmo en la nederlanda urbo *Eindhoven* la direkcio de la *Sekcio por Medicinaj Aparatoj* intencas presigi informajn presaĵojn en Esperanto por dissendo al esperantistaj medicinistoj en la tuta mondo. Por tiu celo ĝi deziras ricevi kiel eble plej multajn adresojn de esperantistaj medicinistoj de ĉiuj fakoj (profesoroj, kuracistoj, studentoj, flegistoj, farmaciistoj, vendistoj de medicinaj aparatoj, k.t.p., de ambaŭ seksoj).

Ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo estas petataj kunhelpi por ĉi tiu grava praktika apliko de Esperanto, sendante taŭgajn adresojn al: *INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO, Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando*, kiu kompilos la adresaron kaj helpos ĉe la dissendo de la presaĵoj.

621.3 : 061.22 = 089.2(100)

621.3(06) : 5(06) ISAE-242

## ALVOKO AL ELEKTROTEKNIKISTOJ

Por ebligi fakan kunlaboron, precipe organizadon de Elektroteknika Sekcio de Internacia Sciencia Asocio Esperantista kaj evoluigadon de elektroteknika terminologio, ĉiuj elektroingeneroj kaj aliaj interesiĝantoj estas petataj kontaktiĝi kun dipl. ing. A. E. K o r p e l a (Finno, Helsinki, Finnlando), kun indiko de sia specialaĵo kaj pri ebloj de aktiva kunlaboro en la sekcio.

## ĜUSTIGO

413.164

E 28

D-ro E. W ŭ s t e r atentigis ke la sciigo en la artikolo de ing. H a f e r k o r n en S. R. 11 150, ke kompletigaĵoj por la UNESKO-bibliografioj estas publikigataj kurante en la multobligita „*Bulletin Mensuel*” de UNESKO, estas ĝusta sole pri la bibliografio de Holmstrom. Suplementojn de la bibliografio de W ŭ s t e r pri la normigitaj unulingvaj fakvortaroj aperigas jenaj tri fakrevuoj: *Lebende Sprachen*, Verlag Langenscheid, Berlin-Schöneberg; *Babel*, Babel-Verlag, Bonn; *DIN-Mitteilungen*, Berlin.